KOMUNIKOJ
TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 45-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2021 N-ro 183

"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
Jesuo *(Mt, 22:37-40).*

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
Zamenhof. *La Espero.*

# LA SISTEMOJ DE DIO

Paulo Sérgio Viana

*"...voĉo de via konscienco, voĉo, kiu estas memoro pri via pasinteco, voĉo avertanta vin, ke vi ne falu denove, ke vi ne refaru samajn erarojn" (La Libro de la Spiritoj, dem. 393)*

"Ĉu mi trinku kafon aŭ teon?"
"Kiun profesion mi elektu – ĉu tiun de instruisto, aŭ tiun de flegisto?"
"Mia amiko kalumniis min! Kiel mi reagu?"

Vole-nevole, nia vivo konsistas el granda sinsekvo da decidoj. Kelkaj estas banalaj, aliaj estas tiel gravaj, ke ili povas lasi konsekvencojn dum longa tempo. Foje ni havas tempon por trankvile pripensi kaj decidi; en aliaj momentoj ni devas decidi rapide, preskaŭ senpense.

Temas pri lerno sistemo. Dio starigis ĝin kiel leĝon: defioj sinprezentas, ni reagas al la defioj, kaj ni per tio devas lerni ion novan - aŭ konfirmi ion ne komplete lernitan. Se ni saĝe decidis, unu paŝon ni faris antaŭen, en nia spirita evoluado; se ni misdecidis, jen ni devas alĝustigi tion en estonta tempo, ĝis kompleta ellerno.

Tial, estas oportune funde kompreni, kiel funkcias tia pedagogio. Eble helpas, ke ni uzu ĝin pli favore al ni mem kaj al niaj kunhomoj.

Kiam ni devas fari decidon, ĉu banalan, ĉu severan, ni devas uzi unu el la tri jenaj rimedoj, kiujn Dio donis al ni:


1. Nian internan kapablon rezoni, senti kaj kompreni. La grekoj bele esprimis tion per la konata sentenco "Konu vin mem". Por tio ni devas konstante analizi niajn tendencojn, niajn fortajn kaj malfortajn korpajn kaj psikajn kvalitojn, niajn limojn, niajn verajn kapablojn. Necesas do dumviva interna dialogo inter "mi kaj mi mem".

2. La edukadon, kiun ni ricevis de niaj gepatroj kaj lernejoj, en la komenco de nia vivo. Precipe dum la unuaj vivojaroj la hejma edukado kaj precipe la ekzemplodonaj agoj de niaj gepatroj fiksiĝas por ĉiam en nia psiko. Dum nia tuta vivo ni devus reviziti tiujn ricevitajn principojn (uzante nian kapablon pripensi ilin) kaj plibonigi ilin, sed fakte ili estas la fundamento de nia menso en la nuna vivo.

3. Niajn rilatojn kun nia "gardanĝelo". Li povas helpi nin en drastaj momentoj, per bonaj konsiloj kaj instigoj. Sed por tio, ni devas konstante allogi lin, por ke li estu ĉiam apud ni. Tion ni faru kompreneble per regula kutimo preĝi kaj starigi bonajn intencojn dum nia vivo. Se ni nutras plej ofte harmoniajn sentojn rilate al aliuloj kaj al ni mem, tiam nia gardanĝelo povas helpi nin.

Laste: ne ekzistas neriparebla mispaŝo. Se ni faris eraran paŝon, kaj se la konscienco tion montras al ni dolore kaj krude, tiam plej saĝe estas rekoni la eraron, pardonpeti kaj serĉi manieron realĝustigi tiun faron. Ni estu certaj pri tio: pli aŭ malpli frue, Dio prezentos al ni la oportunan okazon refari ĝin, espereble en pli taŭga maniero.

Nu, eble iu diros, ke la vivo ne estas facila spertumado. Certe ne. Sed kiel belaj estas la sistemoj de Dio!



**Paulo Viana** verkas en sia blogo kaj priparolas librojn kaj literaturajn temojn en sia Jutuba kanalo. Ekkonu!

**blogdopaulosergioviana.blogspot.com**
**youtube.com/user/paulosviana**

AMIKOJ DE LORENZ

# DANILO CARVALHO VILLELA



Danilo Carvalho Vilela, emerita oficiro de Brazila Armeo, inĝeniero pri telekomunikado, spiritisto, naskiĝis la 21-an de aŭgusto 1940 en la urbo Rio de Janeiro. Li faris elementan kurson de Esperanto en 1961 kaj perfektigan kurson en 1965.

Li estas dumviva membro de UEA ekde 1964, ano de KKE kaj AERJ kaj membro de la Kontrola Konsilantaro de Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz.

Li prelegis pri la temo “Kardec kaj la disvastigado de Spiritismo en Eŭropo”, okaze de la 23-a BKE (Rio de Janeiro, 1987). Li prelegis ankaŭ en la 42-a BKE, Rio de Janeiro, 2007, pri “Socia Respondeco – Hejmo Fabiano de Cristo.”

*Kunlaboris:* ***Eurípedes Barbosa***

# BENATA SANIGILO

ELMIR DOS SANTOS LIMA

Esperanton mi englutis, kiam:
Mi malkuraĝis!
Ĉar laŭhistorie multaj samideanoj devis eĉ alfronti trudemulojn por ke vivu la lingvo; kaj pro ilia sinteno mi decideme antaŭen paŝis...
Mi iun malamis!
Ĉar Esperanto al mi montris, ke por interfratiĝo ĝi venas al nia mondo, lernigante al ni ĉiuj praktiki amon kaj fratecon, de tiam mi ne plu indiferente aliulon rigardas...
Mi laciĝis!
Ĉar sinceraj batalantoj de la movado senhalte ĝis nun laboras trabatante al ni la vojon, tial mi, post nelonga pripensado, tuj fortikiĝis...
El mia buŝo klaĉado eliris!
Ĉar unuflanke el la parolo emanas ia energio, kiu unue trafas, sanigante aŭ malsanigante, la parolanton mem, kaj aliflanke Esperanto venis por boncela uzado de la vortoj, mi senprokraste, honte kaj pente, ĉesis klaĉi...
Mi malpaciencis!
Ĉar la lingvo nepre devas, kiel eble plej pacience, trapasi multajn jarojn ĝis trafos ĝi elstaran pozicion inter ĉiuj aliaj; tial mi de nun forte strebos esti pacienca...
Mi elreviĝis pri la vivo!
Ĉar tian sintenon mi neniam vidis ĉe sindediĉaj movadanoj, de tiam tuja reviglîĝo forigis de mi la nepravigeblan animstaton...
Unuvorte:
Tiun benatan sanigilon por la animo iam mi uzis kontraŭ miaj propraj malperfektaĵoj kaj, preskaŭ mirakle, la sekvantan tagon mi sentis min tute alia homo!

| KOMUNIKOJ | Jaro 45-a
| n-ro 183 | Julio-Aŭgusto-Septembro 2021
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ
Fondita la 15-an de Decembro 1975
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
+55-21-98427-8080
Librovendejo: editoralorenz.com.br
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Fejsbuko: Editora Lorenz






## Fariĝu paciganto...

Libro: Vivo Feliĉa,
Spirito: Joanna de Anĝelis,
Mediumo: Divaldo Pereira Franco

Kie vi estas, tie stimulu la pacon kaj vivu pace. La tumultoj, kiuj konfuzas la homojn, kaj la luktoj, kiuj okazas ĉie, povus esti evititaj, aŭ almenaŭ duonsolvitaj, se la homoj subtenus la bonvolan spiriton, unuj al la aliaj.
Silentigita ofendo, pardonita agreso, bato detenita, evitas konfliktojn, kiuj fariĝus flamoj el malamo.
Fidu al la forto de neperforto, kaj la paco floros en via koro kaj en tiu de ĉiuj, kiuj proksimiĝos al vi.

# KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF



*Al s-ro B. en Moskvo.*

*Pri la "Ligo de Esperantistoj" kaj pri mia rilato al ĝi mi donas artikolon en unu el la venontaj numeroj. La Regularo estis efektive verkita de mi; sed, danke unu eraron en la tempo de la presado, la Regularo akceptis tute alian formon ol mi pensis. Kelkaj punktoj en mia Regularo ŝajnis al la klubo Nurnberga ne bonaj, kaj, ne havante la eblon konsiliĝi kun mi pri tiuj ĉi punktoj, la klubo ŝanĝis la diritajn punktojn laŭ sia propra opinio. Kvankam la intencoj de la klubo estis bonaj kaj la ŝanĝoj ŝajnis tre malgrandaj kaj malgravaj, tamen efektive ili donis al la Regularo tute alian karakteron, ol ĝi devis havi. La afero estos klarigita kaj rebonigita en la venontaj numeroj. — Legante iafoje en la „Esperantisto“ artikolojn kun proponoj de diversaj ŝanĝoj en nia lingvo, vi tute vane timas, ke ni jam havas la intencon fari facilanime rompojn kaj ŝanĝojn en la lingvo. Vi povas esti tute certa, ke antaŭ ol ni decidiĝos fari ian eĉ la plej malgrandan ŝanĝon en la lingvo, ni ĝin longe kaj bone priparolos kaj prijuĝos publike, kaj ia ŝanĝo estos farita nur tiam, se ĝi montriĝos efektive necesa kaj se ĝi post matura priparolado estos akceptita de ĉiuj amikoj sen disputo kaj sen malordo. La artikoloj kun proponoj de ŝanĝoj, kiujn ni iafoje presas (kvankam la plej grandan parton de ili ni persone tute ne povas aprobi), ne havas ankoraŭ ian signifon praktikan — ili estas nur teoriaj preparoj, por ke iom post iom montriĝu, kiaj ŝanĝoj estas efektive necesaj kaj trovas la plej multe da sendisputaj aprobantoj, kaj por ke la proponoj, nun ankoraŭ eble erarantaj kaj ŝanceliĝantaj, lumigu la aferon ĉiuflanke kaj donu la puŝon al la ellaboriĝo de proponoj efektive kaj sendispute utilaj. En la venontaj numeroj ni donos kritikan analizon de ĉiuj proponataj ŝanĝoj en la lingvo kaj nian opinion pri tiuj proponoj kaj ni montros la vojon, per kiu la ŝanĝoj plej necesaj povos esti enkondukitaj sen ia malutilo al nia afero kaj sen rompado.*

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

## NOVA MEMBRO DE LA HONORA PATRONA KOMITATO DE UEA

La 24-an de julio, la Komitato de **UEA** unuanime aprobis la nomon de p-ro **Marco Lucchesi** kiel nova membro de la **Honora Patrona Komitato** de **UEA**. **Marco Americo Lucchesi** estas brazila verkisto, profesoro de la Federacia Universitato de Rio-de-Ĵanejro (UFRJ) kaj nuntempa prezidanto de **Brazila Beletra Akademio** (ABL), unu el la plej respektataj institucioj en Brazilo. Lia laboro pri tradukado estas vere elstara kaj li jam ricevis plurajn premiojn pro siaj verkoj, ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en Eŭropo.

**Lucchesi** lernis Esperanton dum sia junaĝo kaj publike subtenas ĝin. En sia mallonga videa parolado sendita al la **2-a Virtuala Kongreo (VK)**, li parolis pri la neceso krei kulturon de paco kaj tuŝis plurajn temojn rilatajn al medi-protektado kaj socia justeco.

Por la konstruo de daŭripova mondo, li ankaŭ reliefigis la gravecon celebri kaj respekti antikvajn tradiciajn kulturojn, farante belan referencon al la konata antaŭvida sonĝo de la ianomama indiĝeno **David Kopenawa** pri la ĉiela falo, kiu temas pri grava averto al la klimat-ŝanĝo. Ni, la geamikoj de **Eldonejo Lorenz**, kore kaj varme gratulas nian novan honoran patronon de **UEA** kaj kunigas niajn voĉojn al la lia por la estigo de pli bela, justa kaj daŭripova mondo: "paco, paco, paco!".

Pliaj informoj pri li legeblas en la *Gazetara Komuniko* de **UEA** nº 972, 09-08-2021.

*Kunlaboris:* ***Álvaro Motta***



# ALMANAKO LORENZ 2021




**FINFINE, ELDONEJO LORENZ LANĈAS SIAN JARLIBRON, ALMANAKO LORENZ, ELDONO 2021.**

*"La propagando kontraŭ la uzo de drogoj devas esti neŝancelebla."*

Neeldonitaj artikoloj kaj verkistoj el pluraj landoj partoprenas la libron de la jaro de Lorenz. Se vi, eksterbrazilaj samideanoj, volos ĝin ricevi, tute senpaga, per la papera aŭ pdf-a versioj, skribu al ni: *editora_lorenz@uol.com.br*

La papera versio estas disponebla al brazilanoj en nia reta librovendejo: **editoralorenz.com.br**

*Ans Bakker-ten Hagen | Sara Spanó | Renato Corsetti | Trevor Stelle | Anatolij Ionesov | Vladimir Ionesov | Ŝigeki Maeda Chielismo Wang Tiany | Markus Gabor | Keyhan Sayadpour | Stano Marček | Jarmila Rýznaroba | Latifou Gbadamassi Araceli Aguiar | Paulo Sergio Viana | Maŭricio Monken Gomes | Said Pontes de Albuquerque | Elmir dos Santos Lima Eurípedes Alves Barbosa | Eurípedes Kühl | Marcelo de Castro Santana | Abel Sidney | Endre Ady | Aymoré Vaz Pinto Helena das Graças Oliveira | Fernando Burkert Pelachini Valle*

**Gutoj de Spiriteco kaj Frateco:**
Spektu, ĉiusemajne, surbaze de la libro Vivo Feliĉa, eldonita de Eldonejo Lorenz, ĉe la kanalo Joana Pimentel da Silva.




**ELŜUTU LA PLEJ NOVAJN ELDONOJN DE KOMUNIKOJ KAJ ALMANAKO LORENZ PER LA JENA LIGILO:**

https://cutt.ly/eEPCXAc



**SENPAGAJ LIBROJ**

Karaj eksterbrazilaj gelegantoj de "Komunikoj" en la tuta mondo!

Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron "Almanako Lorenz", tute senpage, per la pdf-a aŭ papera versioj, sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso. Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br

Interŝanĝi librojn ankaŭ estas tre bonvena!

Vi, kiu ŝatas legi, koni aliajn kulturojn, filozofiojn... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Estos granda plezuro ricevi verkojn el diversaj landoj!

# MOVADO DE KREAJ ENERGIOJ

La suno prilumas, sed ĝi nur ne ĵetas siajn radiojn, kien oni ne permesas, ke ĝi eniru.
La tabulmuro, kiu ĵetas ombron, ricevas sur sian dorson la sunlumon.

Ĝia ombro estas ja la etendiĝo de si mem, kaj ne la manko de la suna lumo.

Ŝipirante sur la dancantaj akvoj de la kaskada rivero, oni aŭdas la blekon kaj la eksplodon de la akvoj. Ni ja sciu, ke la diferenco de la alto kaj de la riveraj obstakloj estigas la movadon de la akvo, kiu estas esence pura kaj trankvila.

La agoj reguligas la reagojn. Kaj la reagoj devenas de la generantaj agoj.

Oni vigligas la amon kaj ĝi koloras la vojojn per floroj de paco kaj feliĉo.

Se oni aplikas toleremon, sekve daŭros plu la trankvileco.

Se oni klopodas progresi, la montrosupro fariĝas pli proksima kaj pli facile atingebla.

Ni okazigu la movadon de la kreantaj energioj de la homaj estuloj kaj prizorgu la specifan direktadon de tiaj energioj por la kaŭzo de la plej granda bono.

Sekve, niaj virtoj kaj niaj malbonoj ĉiam estigos bonfarajn movojn en niaj vivoj. Koncernas nin fortikigi la efikojn de la movado de la energioj profite al ni kaj, sekve, por la universala bono.

La suno prilumu pli kaj pli!

La akvoj milde fluu kaj atingu pli forajn lokojn!

Dank' al Dio.

*Spirito: Antônio Francisco*
*El la portugala tradukis* ***Benedicto Silva***
*Kunlaboris:* ***João Ângelo***



# KRUCO

***Aymoré Vaz Pinto***

Pensante pri la kruco ni imagas Jesuon fulmobrila je lumo.

La brakoj de la kruco estus kiel lumaj brakoj etenditaj, kies radioj atingas la tutan homaron kvazaŭ dirante ke neniu estas forgesita de sia amo.

Li sekigas larmojn de la patrinoj plej povraj, kiuj dorlotas siajn malsanajn gefiletojn, same kiel vizitas ankaŭ la bonhavajn hejmojn, despli ke ĉiuj estas impreseblaj al fizikaj kaj moralaj doloroj.

Antaŭ du mil jaroj ni ĝenis vin je la kruco, simbolo de malhonoro kaj Vi transformis ĝin en sava simbolo por la homaro.

La kruco kun etenditaj brakoj signifas vian alvokon dirante: *venu al Mi vi, kiu suferas, kaj vi estos liberigitaj de la sufero.*



*La malbonaj pensoj venenas la animon. Ili altiras la pesimismon kaj la malsanigajn ĉeestojn de la perturbitaj kaj malbonaj Spiritoj.*

*Tenu vian menson ligita al la pozitivaj lumoj, ideoj, kaj al la nobligaj programoj de kies konduto venos la intima bonfarto kaj la ĝojo vivi. Kion vi pensas intense, tio hodiaŭ aŭ post kelka tempo realiĝos.*

*La faktoj komence enkorpiĝas en la menso, kaj poste ili fariĝas realaĵo en la fizika korpo. Pensu pri la bono kaj vin banu per la lumo de amo.*

**Spirito: Joanna de Ângelis**
**Mediumo: Divaldo Pereira Franco**
**Libro: Vivo Feliĉa**



# IZOLECO

***Raymundo Souza***

Kiom da personoj paŝas apud ni kaj ne vidas nin.  Same, ni pašas apud ili, kaj ni al ili ne dediĉas almenaŭ rigardeton.

Ĉu vi havas problemojn? Ankaŭ ili havas iliajn, kiaj esti malĝoja, senti sin sola ĉe la homamaso.

Ne estas nur la maljunuloj kiuj sentas la doloron de izoleco. Ankaŭ la gejunuloj, multfoje, sentas sin kiel fremduloj en sia propra familio. La geedzoj ankaŭ sentas izolecon. Ĉu estas pro la indiferenteco de sia kunulo aŭ pro la foresto de siaj gefiloj, kiuj serĉas distraĵojn aŭ amik(in)ojn, kaj nur revenas hejmen proksimume je noktomezo aŭ dum la frumateno.

Kiam tio okazos al la geedzoj, temas pri duopa izoleco. Kaj tio estas la plej granda kaj trista izoleco.



***IZOLECO EN LA HOMAMASO***

***Mi ne estas marmoro!***
***Mi estas granito!***
***Mi ne plibeligas templojn aŭ palacojn.***
***Mi estas pavimo de stratoj***
***Sur kiuj ĉiuj piediras.***

***Neniu aŭdas mian kanton***
***nek mian krion de angoro, malĝojo aŭ ĉagreno***
***transformitajn en krudajn aŭ glatajn ŝtonojn.***

***Malgraŭ ke mi restas***
***meze de la homamaso,***
***mi estas en plena izoleco.***

***Al Luiza***

*Raymundo elkarniĝis la 5-an de aprilo 2020.*
*El "Almanako Lorenz" 2017*





## JAM ESTAS TEMPO!

Karaj gelegantoj!

Se vi ankoraŭ ne aniĝis al nia Asocio, estas tempo por tion fari. Aliĝante al ĝi vi rajtas ricevi, en la komforto de via hejmo, 2 librojn el nia katalogo, portugale aŭ esperante, "Almanakon Lorenz" kaj la bultenon "Komunikoj" (versioj PDF-a aŭ papera).

Krome, vi hajtas akiri aliajn librojn el nia katalogo kun rabato de 30%.

Skribu al ni kaj petu vian aliĝilon: editora_lorenz@uol.com.br